# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

PLENUMITA 12/09/2024 sepcentkvara eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estos sendataj al AEA. (Sen #)

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon

Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagprogramoj Do aŭskultu ĉiujn.

Raporto el la Hispana E-kongreso en Cheste 07/09/2024

# Kluba kunveno en Adelajdo

La septembra kluba kunveno de adelajdanoj okazis zoom-e. La ĉefparolanto esti Helen Palmer, kiu antaŭ nelonge revenis el Darvino. Ŝi prezentis la tiean TELSTRA NAITSIAA nacian art-konkurson de la aborigenaj kaj Torres Markolaj artistoj. La tri juĝistoj aljuĝis 7 premiojn, la unuan en la valoro de 100 000 dolaroj.

Sandor Horvath iniciatis debaton pri la AEA-kongreso kaj Somerkursaro, planataj por la venonta januaro. Ni kolektis ideojn pri kie kaj kiel varbi.

Paul Desailly sendis al Trevor Steele kopiojn de sia korespondado kun la ministro pri edukado Blair Boyer pri la eventuala enkonduko de Esperanto en la eduksistemon. La klopodoj de Paul informi pri Esperanto estas laŭdindaj.

*Katja Steele*



# Interesaj faktoj por Propagando

| *.Lernado de fremda lingvo postulas* | **Komparu Esperanton** |
| --- | --- |
| *Lernu legi la skribitan lingvon. Ofte ĝi ne agordiĝas kun la parolata lingvo...* | ..Fonetike senescepta |
| *Lernu la gramatikon. Ofte ĝi estas plena da esceptoj al la reguloj.............* | ..17senesceptaj reguloj |
| *Lernu vortliston taŭgan por via espera uzo.........................................* | ..Kunmetitaj vortoj |
| *Lernu la standardan prononcon. Ofte ne agordas kun la parolata lingvo..* | ..Unu prononco |
| *Lernu la lokan parolatan lingvon..........................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la ĉiutage mallongigitan parolatan lingvon...............................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu la idiomojn de la lingvo ............................................................* | ..Ne ekzistas |
| *Lernu kiel kompreni la parolatajn respondojn al viaj demandoj............* | ..Unu monda lingvo |

## Esperanto ne havas tiujn malfacilaĵojn

La plej multaj Esperantistoj lernis Esperanton kiam ili estas plenkreskaj

Do ili estas tre toleremaj kaj helpemaj al lernantoj. *Roger Springer*

AUSTRALIANS FOR WAR POWERS REFORM

AUKUS and the campaign for genuine transparency

ĉi tiu ligo nun ne funkcias

## Maŝina traduko de parto de artikolo sekvas

La AUKUS-pakto estas unu el la plej grandaj defendaj projektoj en nia historio sed ĉu vi sciis, ke la decido de la ALP subteni la planon de ĉefministro Morrison estis farita en nur 24 horoj kaj neniu en la laborista kunveno estis konsultita?

Raportoj indikas ke eĉ multaj kabinetministroj havis neniun vorton. La tuta parlamento ankaŭ estis ekskludita de la decidprocezo, kune kun la ĝenerala publiko. La aŭstralia publiko havis nenian enigon, kaj tamen oni diras al ni, ke Aŭstralio estas demokratio kie travidebleco kaj respondeco estas plej gravaj.

Ĉe AWPR ni batalas por pli bona sistemo, kie niaj elektitaj reprezentantoj efektive rajtas prezenti niajn opiniojn kiam amasaj defendaj decidoj estas faritaj. Neniam estis pli grava tempo por premi por aŭtentika demokratio, travideblecon kaj respondecon.



*Roger Springer*

# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 5-a de septembro 2024

Ĉeestis: Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Terry Manley, Bradley McDonald, Caroline Turner

### (1) Membriĝa procedo

Ni klarigis la jenan situacion: se iu membriĝas dum novembro aŭ decembro

### (2) Somerkursaro 2025

La preparado daŭras.

Hoan el Vietnamio , kiu instruis en januaro en Ballarat, nun ja refoje venos por instrui en Adelajdo en januaro 2025. Heather kontaktos ŝin pri la flugbileto.

Trevor Steele estos la alia instruisto.

Nia limdato por informi St. Ann's pri la "finaj" ciferoj de la partoprenantoj estos la fino de oktobro

Ni celo estas ke 40 homoj partoprenu!!. Ĝis nun 17 homoj aliĝis.

Bonvolu helpi kun la varbado

La informo pri la somerkursaro 2025 estos sur nia retejo. Bonvolu registri kaj reklami inter viaj amikoj.

### (3) Esperanto Domo en Melburno

La serĉado daŭras.....

### (4) Jonathan estos en Kanado inter la 24-a de sept kaj la19-a de nov

### Venonta estrarkunveno:

Ĵaŭdon, la 19-an de septembro 2024 je la 17:00 (16:30 en SA)

Jes ... vi povas/rajtas partopreni, se vi volas.

# Aŭstraliaj Esperantistoj unua eldono 26/09/2011